

Boulogne sur Mer

la 25-an de Oktobro 1920, 16a horo

Kara samideano,

grandan dankon por via interesa letero de la 16-a de tiu monato. Vivu Esperanto, kiu estas la ligilo inter ni. Ni kiu sen ĝi neniam estus konataj unu de la alia. Dankon por via interesplena portreto. Vi tute ne aspektas la latinajn racojn – Ĉu vi estas el Saksa aŭ Slava deveno?, diru al mi kaj pardonu mian nescion pri tio. Mi kredas ke mi estas tute nesciemulino pri via lando. Vi certe scias pli pri Francujo, unue ĉar ĝi estas pli fama kaj konata, due ĉar vi kaj viaj samlandanoj estas pli lernemaj ol ni. Vi, ĉiam, kiel la Germanoj konas pli bone fremdajn lingvojn kaj vi ankaŭ konas pli bone la gremdajn literaturojn. Vi laboras pli vi ludas malpli kaj vi dons malpli la tempo al sportoj ĉu praktike, la rezultato ĝenerale estas pli bona oni ne scias.

Mi vidas ke vi havas multan libertempon ĉar vi povas okupi vin, ĉiu vespere pri muziko, Esperanto, k. t. p. Mi enias vin. Neniam mia edzo povas trovi tempon por fari alian aferon ol labori. Li malsaniĝas pro tro da laboro. Kion fari? Estas ĉirkaŭ 5 advokatoj inter 30 kiuj vere laboras tie. Estas du konataj kiuj havas multajn, multajn procesojn. Unu el

NA LEVÉ STRANĚ DOPISU:

Kia bela P.Markovia 0,60 sur via leterkoverto!!

Kio signifas J. U. antaŭ via nomo kaj ankaŭ ? antaŭ Prelouc

ili estas mia edzo. Li estis tre forta homo sed de post la milito li estas tre laca. Mi ŝatus ke li prenu seriozan sekretarion. Sed por tio estas necese havi veran advokaton al kiu oni devus doni ĉirkaŭ 20000 frankojn po jaro kaj poste mi estas certa ke malgraŭ la helpo, mia edzo tamen laboros. Rifuzi malgrandajn procesojn? Estas maloportune ĉar tiuj kriterioj en la estonteco povo(hovoraies). Ili pagos malgraŭ ĉio kaj oni ne povas esti ŝtelisto aŭ fripono, ĉu ne? Do.... la rezultato estas daŭri same labori kaj esti laca, lacega. Mi laboras por li ĉiujn matenojn preskaŭ de la 10a ĝis 12a 30 kaj ofte vespere ankaŭ. Mi ŝategas tiun laboron. De post la milito estas malpli da procesoj sed ili estas pri gravaj. La eksedziĝoj ĉefe ekzistas. Rezultato de militoj:

Jen la teo kiun oni alportas . Estas kutimo ĉe la Angloj kaj ĉe multaj Francoj, je la 5-a trinki teon kun lakto, panon kaj kukojn. Jen oni sonorigas por fajrego ena la urbo 21h vespere. Oni vidas grandegajn falmojn kaj mia edzo kaj filo ekeliris rapide por vidi kie ĝi estas. Ni havas alian domon kiun ni luigas al personoj kaj ĝi ŝajnas esti en tiu direkto. Mi tiel esperas ke ne.

Mi ŝatus iri ankaŭ. La ĉielo, la luno estas belegaj sed bedaŭrinde mi malvarmumis forte kaj hodiaŭ tusas kaj tute ne povas eliri antaŭ kelkaj tagoj. Estas en tre antikva granda dvardia turo, kie oni nun sonorigas. Estas tre antikva kutimo. Ĝi sonorigas ankaŭ pro la aeroplanoj bombardadoj dum la milito. (Ho! Kiel ili estis teruraj, ankaŭ en Londono kie mi estis). Ĝi sonorigas la horojn ankaŭ kaj la

antikvan eknoktan signalon ĉiu vespere je la 10a vespere., mi forlasos vin . Bonan nokton ĝis morgaŭ.

Bonan tagon, S-ro. Jen mi daŭras mian interrompitan hieraŭan leteron. Pardonu, mi petas, mian malbonan skribaĵon. Se mi obte skribas kiel nun, sur miaj genuoj sidata en seĝego aŭ eĉ etendita sur lito aŭ sur kanopo. La brulado hieraŭ vespere estis tute apud nia domo, sed ĉe ligno vendisto.

La vetero estas belega, pli bela, pli hela ol en somero. La fruaj matenoj, la vesperoj estas malvarmaj, nur +4° celsiusgradoj sed la suno estas varmega. Ni havas hejtaparaton, kiu varmigas nian domon kaj ni brulas koakson – la fajrujo brulas de Oktobro ĝis Aprilo sen estingiĝi. Ni brulas 1000 ĝis 1500 kilogr. po monato.

Jes, vere dankema mi estas ke mi partoprenis la Boulognan Kongreson. Ĝi vere estis „neforgesebla“. Mi nur bedaŭras ke mi estis iom juna por estimi ĝin kiel mi povus fari nun se ĝi reokazu.

Mi ĉeestis la Koncerton en la Berna Kasino sed malfeliĉe ne memoras la viran ĥoron. Mi aŭdis belegan virĥoron en Krakovo. Certe mi vidis la operon „Halka“ en Krakovo kaj la dramon „Mazepa“ ankaŭ – ĉiam D-ro Aleksandro Zamenhof, frato de nia Majstro akompanis nin. Post tiu Kongreso, ni vizitis kun li kaj aliaj Zakopane ktp. en la Tatraj montoj. Eble mi jam diris tion al vi. Mi multe timas rediri al vi tion kion mi jam diris. Senkulpigu min se tio okazos.

Vi diras en via letero ke se okazos teatro aŭ politika kunveno, vi iros. Ĉu ekzistas teatro en tiel malgranda urbo? Sekve, ĉu vi okupiĝas pri politiko? Oni ofte petis de mia edzo ke li estu kandidato, sed, ĉar mi petegis lin ne fari tion, li ĉiam rifuzis. Mi korespondas de pli ol du jaroj kun Meksikano Esp. kiu forte miksiĝis en politikaj aferoj en sia lando. Li estas tute kontraŭ sia regado. Li estas ĉiam por la popolo, estis amiko de Ferrer kiu estis kondamnita al la mortigo sen vera proceso en Hispanujo. Li estas tute anti religia. Tre tre interesa. Mi ankaŭ havas korespondanton se mi nur skribas 3 aŭ 4 foje po jaro. Li estas ortodoksa pastro apud Eperies en via lando. Tute malsimilaj ili estas kiel korespondantoj. La lasto, pro la tro multekosta vivo en nia lando forveturos Amerikon & enŝipiĝos Boulogne s/m la 12an de Novembro. Mi do konatiĝos persone kun li. Kian strangan impreson oni devas havi post longaj jaroj interkomprenataj leteroj, sin vidi materiale.

Kial vi diras, ke post 300 jaroj Bohemoj vivetis preskaŭ elmortis (pri la venkinta batalo „Blanka Monto“)? Mi ne tre bone komprenis vian **aludon**.

Mi envas vin se vi konas Italan lingvon. Ĉio kio estas itala altiras min pri arto, beleco, poezio, Romanajn impresojn, fantazio ktp. Sed pri praktikeco ili ĝenerale estas senvaloraj. Se kian lingvon vi parolas hejme ĉiutage? por pledi ktp.? **Pole** ŝajnas tiel malfacila ĝiaj sonoj plaĉas al mi ĉar mi tiel ofte aŭdis ilin ĉe la familio Zamenhof

Kio signifas „liberulo“ en la senco kion vi donas? Vid iris ke ni fariĝis soldato, poste „liberulo“. Ĉu vi batalis en **Skutari**?

Vi estis sendube en Austria regimento. Sed nun, ĉu vi estus ĉeĥa soldato se okazus milito en via lando?

Mi gratulas vian edzinon ĉar ŝi lernas Esperanton. Tiom da edzinoj lasas tion por la edzoj. Kiel mi ŝatus traduki kune artikolojn de la Krestomatio, kun mia edzo!!!

Ho, ve tiu malbenita laboro.

Mi tre bone konas Ant. Grabowski. Mi renkontis lin en multaj landoj. Mi amas liajn poezion. Li verkis unu por mi.

Mi tute ne komprenis vian lastar frazon: „Jak ke ni ĉiuj povu partopreni en nia amata ĉefurbo la unuan kongreson mondan de nia lingvo.“

Kial la 1an kongreson! Vi sendube parolas pri la venonta Kongreso en Praha. Eble vi volas diri ke ĝi estis la unu en Praha??

Mi rimarkas ke vi uzas la vorto „eĉ“ por „ankaŭ“ kaj tio okazas al mi skuetojn kiam mi legas ekz.: mi „fance“ mĉme“ kaj vi komprenos ke mi demandis min kial do mia edzo ne estus vida je via saluto?“ k.t.p.

Ĉu vi komprenas mian petolaĵon?

Mi havis tre okupatan matenon hodiaŭ pro kuirajoj kaj mastrumado. (La nunaj servistoj estas ĉiam malbona kaj maltaĝaj). Samtempe mi devis fari „tabelon“ por mia edzo. Li havas klienton kiu havas 60 procesojn gravajn samtempe. Estas terure. Nature oni devas prokrasti la pledon. Li okupas sin pri la transveturigo de komercaĵoj. Ofte ili estas difektigitaj aŭ liveritaj tro malfrue. Do, postuloj al la kontrolo. Estas vera rento por mia edzo. Apenaŭ unu proceso **finata** alvenas aliaj (oni eĉ ne atendas la finon de la unuaj). Kiel mi ŝatus ke li ne havu tielan klienton.

Ĉu vi legis pri la Irlandaj kaj anglaj aferoj? Ĉu vi legis ke la urbestro de la urbo „Cork“ en Irlando, kondamnita al du jaroj da malliberejo por politika krimo, rifuzis sin nutri kaj hieraŭ post 13 tagoj sen nutro fine mores?

Kio okazos nun? Pli granda revolucio ankoraŭ eble? Mi certe ne ŝatus esti Lloyd George en la nuna momento. Li siam rifuzis Liberaci lin. Kian kuraĝon tiu homo havis ĉar liaj suferoj estis gradegaj.

Jam mi skribis kaj skribis kaj ne ŝajnas al mi ke mi parolis en ia ajn maniero pri kio mi intencis.

Ĉu la vintro estas severa, tre malvarma ĉe vi? Tie, ĝenerale ne tre – ĝis – 1° - 8° kiam estas tre malvarme. En 1917 – 12°, 14°, 15°. Sed estis terue. Kaj mi forlasis sola tiun temperaturon por la Riviera kie pro granda nekutimata varmeco mi havis bronkiton. Tamen mi ĝuis Niceon dum 3 monatoj. Kia belega klimato kaj lando. Bluega maro kaj ĉielo. Mi desegnis kaj pentos multe dum mia ĉeestado. Suda Francoj ne similas nordajn Francojn. Ĉu vi jam vidis la maron kaj ĉu vi ne amegas ĝin. Eble estas, la Adriatiko kiun vi jam vidis. Mi iris merkredon sur maro kaj vizitis la transatlantikan ŝipegon kiun prenas mia amiko la greka pastro, baldaŭ.

Dankante tutkore vin por via interesa letero, por via bela fotografko mi restas siam

Sincere via Alice Sergeant